6-a JARO, N-o 308



LEIPZIG, 28. / 8. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE	REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio).	APERAS SEMAJNE

GIORDANO BRUNO – MARTIRO DE L' LIBERA PENSO

Ne decas, ŝajnas al ni, malatenti per silento en "S-ulo" pri memordato, iom malproksima en la pasinto, sed malgraŭ tio ne malpli emociiga k instrua por ni. En ĉiuj jarcentoj mortis herezuloj por siaj ideoj, kiam ili malkaŝe elpaŝis kontraŭ dogmoj k kontraŭ la institucioj, kiuj predikas k disvastigas dogmojn. Bruno estas nur unu el multaj, sed unu el la plej admirindaj. *RED.*

Kiel admonanta flamsignalo por ĉiuj liberaj spiritoj lumas el la pasinto en nian ankoraŭ ĉiam tiel malluman tempon la lignoŝtiparo de Giordano Bruno, kiu estis bruligata je 17. februaro 1600 laŭ la ordono de l' katolika eklezio. Unu el la plej bonaj, plej liberaj k plej kuraĝaj viroj ĉesis vivi antaŭ 330 jaroj sub la manoj de l' ekleziaj ekzekutistoj. Kiel bando da sangavidaj lupoj la altranga pastraro ĵetis sin sur tiun ĉi viron, kies korpon ĝi povis detrui, sen ke ĝi sukcesis ekstermi liajn pensojn.

Hodiaŭ ni apenaŭ povas imagi, ke la doktrino de Koperniko, kiu aperas al ni ĉiuj tiom memkomprenebla, iam plej akre ekscitis la spiritojn, ĉar ĝi ja renversis ĉion malnoviĝintan k forpuŝis la homon el lia pozicio kiel centro de l' universo k fincelo de l' kreado. La sango de multaj martiroj gluas je la nova doktrino, ĉar temis supervenki gigantan malamikon, arkaiĝintan mondkoncepton, kiu intime estis kunligita kun la plej granda politika potenco de l' epoko, kun la potenco de l' eklezio, kiu timis nenian rimedon por ekstermi siajn kontraŭulojn. Sed la novaj ideoj estis pli fortaj ol la reakcio.

Unu el la plej grandaj k entuziasmaj batalantoj estis Giordano Bruno, kiu en la jaro 1548 naskiĝis en Nola. Lia deveno ne estis tre nobla, ĉar lia familio estis malriĉa. En la 15. vivjaro li eniris kiel novico la monaĥejon de l' sankta Dominiko en Napoli, tre verŝajne, por povi dediĉi sin malgraŭ sia malriĉo al la sciencoj. En tiu ĉi monaĥejo li pasigis 13 jarojn. Estas kompreneble, ke tiel liber-ama genio jam frutempe devis ribeliĝi kontraŭ la spirita devigo de l' monaĥeja vivo. Baldaŭ ankaŭ ekokazas interpuŝiĝoj kun la estroj. Tro malvasta k tro malgranda fariĝis la mondo de l' mezepoko, "kiam la admonanta vorto de Koperniko frapis al la pordo de lia junula animo". Per liberaj opiniesprimoj k per la legado de malpermesitaj libroj li fariĝis suspektata. En la jaro 1575 la provinca estro de lia kongregacio prezentis gravan akuzon kontraŭ li pro herezo. Ĉi tiu aperis al Bruno kune kun personaj malamikaĵoj de malbonintencaj kunkongregacianoj tiel danĝera, ke li forkuris de Napoli al Romo, por sin mem defendi ĉe la prokuroro de l' kongregacio. Sed malbonaj sciigoj sekvas lin; malpermesita libro estas trovita, kiun li estis ĵetinta antaŭ la forkuro en sekretejon de la monaĥejo. Li nun demetis la monaĥan kostumon k vagis kiel privatinstruisto tra la italaj urboj. En Genovo la forkurinto unuafoje haltis. Ĉi tie li havis okazon observi la tutan degeneron de l' religio, kiu akuzis k persekutis lin kiel herezulon. Ĝuste estis solenata grava eklezia festo k la monaĥoj de Kastelo *(Castello)* elmontris sian plej sanktan relikvaĵon, nome la laŭdiran voston de l' azenino, kiu portis la Sinjoron dum lia lasta paska vojaĝo. La kredema popolo alpremiĝis al la silkovrita sanktaĵo, k la monaĥoj kriis kiel la foir-marĉandistoj: "Ne tuŝi! Kisu ĝin! Estas la relikvaĵo de tiu sankta azenino, kiu estis konsiderata digna porti nian Disinjoron de la Olemonto al Jeruzalemo. Odoru ĝin! Kisu ĝin! Prezentu almozojn! Vi ricevos centoble k akiros la eternan vivon!" Naŭzita de tio Bruno skribis tiam soneton kontraŭ la malklero k nepensemo, por scienco k racio, en sian taglibron.

Sed nenie la rifuĝanto estis ŝirmita. Ĉie embuskis la spionoj de l' inkvizicio. Tiel li, la filo de l' sudo, estis pelata trans la alpojn en la malserenajn nordajn landojn. En Ĝenevo, la fortikaĵo de l' Kalvinismo k la rifuĝejo de multnombraj italaj protestantoj, li trovis okupon en la presejoj. Sed la espero de Bruno, esti atinginta sidejon de religia libero, estis maldolĉe trompata. Ĉar li rifuzis ĉiujn konvert-altrudojn k eĉ havis la kuraĝon ataki la opiniojn de iu Ĝeneva filozofi-profesoro per malgranda pamfleto, la eklezi-estraro malliberigis lin kaj la presinton de lia skribaĵo. Tri monatojn poste li skuis de siaj piedoj la Ĝenevan polvon.

Senripoze li migris, serĉante panakiron, tra Svisio k Francio ĝis Anglio. En la domo de l' franca ambasadoro Mikaelo de Kastelno *(M. de Castelnau)* li travivis la plej feliĉan tempon de sia vivo k du jaroj da ripozado k paco produktis senmortajn verkojn. Per verko pri la memor-arto li akiris al si la instru-rajton ĉe la universitato de Oksford. Dum granda universitata soleno li profitis la okazon, por varbi en ampleksa disertacio por la kopernika mondsistemo. Sed li havis kontraŭ si la tutan Oksfordan profesoraron. Mezepoko k moderno interduelis. Kiam la Oksfordaj profesoroj ne sukcesis refuti la opiniojn de l' malagrabla novigulo, ili prenis la lastan rimedon k malpermesis al li la instruadon. En lia publikigo "Cindromerkreda manĝo" Bruno tiam atakis plej akre la anglajn vivkondiĉojn k defendis per entuziasmaj vortoj la kopernikan mondsistemon.

Pensante pri Koperniko Bruno

+ Ablehnung

digna würdig — voll

embuskis Versteckt
Fallen Hinterhalt

sentis sin kvazaŭ liberigita de katenoj. Kristalaj sferoj ĝis nun estis ĉirkaŭbarintaj la universon kiel malliberejaj muroj. Nun ili disrompiĝis k la kosmo fariĝis granda k vasta. Nur en la lasta sun-stela sfero la kopernika sistemo trovas limon. Sed la univers-ampleksanta spirito de Bruno disbatis ankaŭ tiun k metis kun admirinda antaŭsentemo la malproksimajn sun-stelojn kiel sunojn similajn al nia Suno en la senfinan universan spacon.

La senfine multaj mondoj sur la ĉielo, tiel instruis Bruno, estas ĉiuj similaj inter si. La miloj da sun-steloj, kiujn ni vidas brileti ĉe la nokta firmamento, estas sunoj, ĉirkaŭ kiuj planedoj rondiras, kiel ĉirkaŭ nia Suno. La substancoj, el kiuj kunmetiĝas la astroj, estas ĉie la samaj. Sed ankaŭ la ekzistokondiĉoj sekve ĉie estas la samaj, k ĉiuj malproksimaj k proksimaj planedoj devas esti loĝataj kiel nia Tero. Kion la scienco, la spektra analizo, esploris k instruis preskaŭ tri jarcentojn pli malfrue, tion la filozofo estis antaŭvidinta.

La multnombro da loĝataj mondoj estas kontraŭdira al la instruoj de l' eklezio k biblio k Bruno sciis, ke la eklezio lin tial persekutas kun nepacigebla malamo. Tiel li restis ekzilito en malserena nordo. Sed la sopiro al lia hejmo, al la blua ĉielo k la varmiga suno, ne forlasis lin k iĝis tiel forta, ke ĝi malfortigis la voĉon de l' racio. Nobelo, Giovanni Mocenigo estas la nomo de l' malnoblulo, skribis al Bruno k logis lin al Venezio, pretekste por ĝui lian instruon. Ĉar Bruno estis en financa malbonstato, li sekvis la inviton.

En la nokto al 22. majo 1592 la nobelo kun ses viroj penetris en la dormoĉambron de lia instruisto k malliberigis lin. Komenciĝis peniga proceso. Bruno defendis sin kun suda temperamento. Sed la inkvizicio estas surda, se ĝi ne volas aŭdi. Oni celis lin rezignigi k minacis lin per la torturo. Oni transportis lin de Venezio al Romo, kie li ok jarojn estis tenata en karcero. Pri la juĝ-traktadoj nenio estas konata. Sed dum la longjara karcera restado kreskis la forto de spirito k karaktero de Bruno. Kio estas sorto de unu homo, se miloj da vivon donantaj sunoj moviĝas en la universo? Kion signifas malgranda homvivo, se temas batali por granda, mondliberiga ideo? Tiel li akiris la forton necedeme konfesi por sia instruo. Kaj lastfoje starante antaŭ siaj juĝistoj, li parolas aŭskultante la verdikton kun trankvila seriozo: "Kun pli granda timo vi konigas la verdikton, ol mi akceptas ĝin!"

En la 17. februaro 1600 Bruno suriris la en Romo starigitan ŝtiparon. La papo festis sian jubileon. Multnombraj pilgrimantoj el ĉiuj landoj ĉeestis en la Eterna Urbo. La plej altrangaj eminentuloj de la katolikaro amuziĝis, arigitaj ĉirkaŭ sia ĉefo, la anstataŭanto de Kristo, ĉi tie pri la agonio de l' filozofo. Sed nenia krio eliĝis el li, k kiam iu el la ekzekutistoj tenis antaŭ liaj okuloj krucon, li deturnis sian kapon kun muta malestimo.

Tiel mortis la "princo de l' herezuloj", unu el la plej bonaj homoj k plej grandaj filozofoj. Sed liaj pensoj vivas ankoraŭ . . .

Kompiltradukita laŭ artikolo de E. Krug en germanlingva revuo "Der Freidenker" (La Liberpensulo).

Fakpaĝo mankas en tiu ĉi n-o, ĉar ni ne ricevis ĝis redaktfino la koncernan materialon.

ĈU ESTONIO RICEVOS NOVAN KONSTITUCION?

SAT-ano 15 428, Pärnu

Fort-potenca prezidanto anstataŭ nuntempa demokrata ŝtatestro. — Reakciaj partioj laboras harmonie por ellabori novan, reakcian konstitucion

Jam delonge kelkaj dekstraj partioj en Estonio esprimis sian malkontenton pri la konstitucio de l' ŝtato. Laŭ la nuna konstitucio Estonio ne havas prezidanton kun tiel forta potenco, kiel ekz. en Finnlando, Germanio ktp., kie la prezidanto havas rajton disigi la parlamenton, kiam li tion deziras. Nia "Riigivanem", traduke "ŝtatestro", estas elektata de l' parlamento. Se li plu ne plaĉas al la parlamento, ĉi tiu havas rajton elekti novan ŝtatgvidanton k eksigi la malnovan. Resume — nia ŝtatestro estas absolute dependa de l' parlamento, ĉiuj liaj ordonoj havas nur post la sankcio de l' parlamento ekzisto-rajton. Tial ankaŭ ofte okazas, ke jam post kelkaj monatoj estas elektata nova ŝtatestro.

Tia situacio tute ne plaĉas al la dekstruloj, kiuj ankoraŭ songas pri fort-potenca reganto k alt-estimas Musolini, Pilsudski, Horti k aliajn siajn samideanojn. En niaj burĝaj gazetoj jam antaŭ kelkaj jaroj oni montris, kiel Italio, Polio, Litovio k Hungario floras sub regado de siaj potencaj diktatoroj, k preskaŭ malkaŝe la reakciuloj multfoje montris al unu el estonaj politikistoj-generaloj: "Rigardu, li estas la Savinto, kiu povus ankaŭ en nia lando regi same, kiel Musolini, Pilsudski k Horti en siaj landoj."

Tiuj pensoj pli proksimis al realiĝo antaŭ la elekto de nova parlamento en fru-printempo de l' nuna jaro, kiam la politikisto k generalo Laidoner publike deklaris, ke li ne lasas sin denove elekti en parlamenton, antaŭ ol la konstitucio de la ŝtato estos ŝanĝita. La plej granda dekstra partio — la kamparana partio, kies plej eminentaj gvidantoj estas eks-ŝtatestroj *Päts*, *Teemant* k. a., deklaris al la popolo antaŭ la elekto de nova parlamento dum publikaj kunvenoj, ke ilia plej grava tasko en nova parlamento estas ellabori novan konstitucion kun antaŭvidita fort-potenca prezidanto, kiu havus rajton disigi la parlamenton k estus elektata por pli longa tempo. Preskaŭ samon esprimis ankaŭ la nacia partio, kies ĉefo estas konata eks-ŝtatestro *Jaan Tõnisson*.

Sed ŝanĝi la konstitucion de la ŝtato en Estonio rajtas nur la popolo mem, k por tio oni bezonas konsenton de preskaŭ du trionoj el la elekto-rajta popolo. Tia estas tre malfacile ricevebla, ĉar la du nomitajn partiojn subtenis en baloto nur 33% el la popolo. Tial dum lasta duonjaro estonaj reakciuloj entute ne tuŝis publike la demandon pri ŝanĝo de l' konstitucio, sed ili serĉis al si sampensantojn. Antaŭ la komenco de l' somerripozo parlamenta estis aranĝita kunveno inter dekstraj partioj, por solvi la problemon pri ŝanĝo de l' konstitucio, sed ankoraŭ tiu kunveno ne donis rezultojn, ĉar ĉiu dekstra partio havis siajn planojn k proponojn pri nova konstitucio k prezidanta instanco.

Iuj deziris prezidanton laŭ modelo de germana respubliko — kun malforta potenco, aliaj deziris doni al li potencon de Musolini. Tamen la planoj en sia komuna parto estis egalaj, k dum somero oni daŭrigas la ellaboradon de l' nova konstitucio en la marurbo *Pärnu*, kiu estas la plej ŝatata ripozloko de l' estona burĝaro. Tial ankaŭ la ĉefoj elektis speciale tiun lokon por ellaboro de nova konstitucio, por ke ili povu esti kune dum la tuta somero sur belega marbordo k tie pritrakti sur blanka strand-sablo la gravajn politikajn problemojn. Pli frue la tiel nomata "Labor-partio" tute kontraŭis al la prezidanta instanco, sed nun ĝi eĉ postulas prezidanton kun tre forta potenco. Estu menciite, ke tiu "Labor-partio" tute ne estas laborista nek socialista partio, sed tute dekstra k burĝa partio, konsistanta el komercistoj, akciuloj k fabrikposedantoj, kiu nur uzas la belegan nomon "Labor-partio" por ŝteli la voĉojn de laboristoj dum balotoj. Nun kun ĉiu nova baloto la partio degelas k havas nun en la parlamento nur 8 reprezentantojn. Tamen la nuna

ŝtatestro apartenas al la "Labor-partio", k la partio, kiel meza partio inter dekstraj k maldekstraj partioj, ludas gravan rolon en la politika vivo de Estonio. Nun tiu partio ankaŭ havas siajn proponojn pri nova konstitucio, k aliaj dekstraj partioj estas devigataj atenti tiujn proponojn.

Estas ankoraŭ tro frue aserti, ĉu el la strando de belega urbo Pärnu Estonio ricevos sian novan konstitucion. Tamen fakto estas, ke ĉiuj dekstraj politikistoj, ĉefoj de dekstraj partioj, s-oj Tönisson, Päts k la urbestro de Pärnu, s-ro Kask, kiu apartenas al la "Labor-partio", nun harmonie kunlaboras por ellabori plej reakcian konstitucion.

Se vere ili sukcesos, la estona laboristaro estos ankoraŭ pli multe subpremata politike k ankaŭ ekonomie. Jam nuntempa dogan- k impost-politiko de l' registaro celas pliriĉigon al kapitalistoj je la kosto de l' laboristaro; tial oni povas jam imagi, kia estos la situacio, kiam la tuta potenco apartenos al fort-pugna prezidanta moŝto. Kompreneble la estona socialista partio per ĉiuj siaj fortoj laboras kontraŭ la fi-paŝoj de l' burĝaro por ne pli suferigi jam tiom suferantan laboristaron.

ROMANTIKAJ LUDOJ

Esperkoro, Kaunas.

Ludoj estas kvietiga rimedo por infanoj, por ke ili ne ploru. Sed la sperto montras, ke la ludoj taŭgas ankaŭ por plenaĝuloj por fortiri ilian atenton de la ĉiutaga mizera vivo.

La faŝista registaro k naciistaj rondoj en Litovio nunjare aranĝas publikajn ludojn okaze de la 500-jara datreveno post morto de la granda duko de Litovio — Vitoldo *(Vidaŭtas)*. La festado de tiu datreveno daŭras tutan jaron. Longaj artikoloj en naciistaj gazetoj, pompaj paroladoj en haloj k sur urbaj placoj, luksa prezentado de konvenaj historiaj dramoj k misterludoj — ĉio ĉi havas taskon sugesti, hipnotigi la amasojn, por ke ili tra la glorplena pasinto ne vidu sian nuntempan mizeron, ekspluatadon k subpremon, ne serĉu kaŭzojn pri tiu mizero k eliron el ĝi. Vitoldo estas glorata kiel sanktulo, kiel Mesio. Por plenigi la analogion, oni skulptis specialan bildon (ikonon) de la Duko, k oni portadas ĝin tra la tuta Litovio, simile kiel dum religiaj procesioj. Ministroj, urbestroj, pastroj k aliaj honorpersonoj partoprenadas la procesiojn por pligrandigi la impreson de la ludo. La administraj oficejoj en provinco havas devon zorgi pri sufiĉa kvanto da rigardantoj. Kelkaj tro fervoraj komunumaj oficistoj ordonadis sub minaco de puno (!) al vilaĝanoj ĉeesti la proksiman urbeton dum trapaso de la Vitolda bildo. Unu el la iniciatintoj de tiu ĉi procesio (pastro J. Tumas) antaŭvidis mem en sia parolado, ke multiuj primokos tiun ĉi ludon, sed "ni tion faras sincere, ĉar ni estas romantikuloj".

Por plenigi la dumjaran festan programon, oni elpensis ankoraŭ memorigon je Tannenberga batalo, festotagon de la patrino de Vitoldo ktp., ktp., k ĉio kun pompo: muziko, prezentadoj, paroladoj. Rigardu, ĝuu la romantikajn ludojn, ho malsata k subpremata popolo, nur ne pensu pri reala batalo por pano k libero!

LA KALEJDOSKOPO DE L' VIVO

Kontenta detronigito

La persono, kiu estas plej feliĉa pri la lastatempaj okazoj en Rumanio, estas sendube la detronigita juna reĝo Mikaelo, kiu estas naŭjara. Revenante kun la reĝo en la palacon, li diris subite al sia patro: "Mi esperas, ke vi restos reĝo dum tre longa tempo. Tiel mi havos pli da tempo por amuziĝi. Min lacigis la salutado k revuado je trupoj paradantaj. Nun estas via vico fari tion, k mi estas libera por ludi tiom kiom plaĉos al mi."

La katolikismo en Japanio

La katolikaj agitantoj en Japanio dividis tiun landon en dekdu eklezi-ajn teritoriojn. La plej grandan influon ili havas en la teritorio (eparĥio) de Nagasaki, kie ekzistas 54 514 katolikoj inter 7 050 000 da loĝantoj. Sume ekzistas en Japanio 92 161 katolikoj k 265 presbiteroj, el kiuj nur 54 japanaj. Tiun ĉi jaron estis presbiterigitaj 5 japanoj. Helpantaj pastroj estas 162 k monaĥinoj 336, el kiuj 137 japaninoj. Sume ekzistas tie 228 preĝejoj k 57 kapeloj, 38 katolikaj lernejoj, 16 orfejoj k 8 kuracejoj. *Laŭ "Espero Katolika".*

VOJAĜAJ IMPRESOJ

En "S-ulo" n-o 287 mi legas, ke K-do Sidorov (5458) inter aliaj aferoj deziras legi pri vojaĝaj spertoj de eksterlandaj K-doj k kiel ili utiligis esp-on. Mi ne estas maristo, tamen mia metio devigas min vojaĝi. Tiel okazis, ke je la fino de 1925 mi forlasis Brition por plenumi 6-monatan kontrakton en Sud-Ameriko.

Ĉar mi ne estas natura artisto, rilate al vojaĝo, malfeliĉe mi ne povas transskribi la mirindaĵojn de la vasta maro nek la pentrindajn vidaĵojn de la multaj insuloj, ĉe kiuj la vaporŝipego haltis dumvoje. Min pli frapis la frenezo de nia sociordo, tiel kiel ĝi speguliĝas sur pasaĝerŝipo.

La unua klaso okupas tri kvaronojn de la ŝipa spaco. La luksaĵo ĉiurilate superas eĉ tiun de surteraj burĝaj hoteloj. Promenejferdekoj okupas preskaŭ la tutan longon de la ŝipo. Tiel la supera klaso povas ludi k streĉi la krurojn per ĉiutagaj promenadoj. Aliflanke la 2-a k 3-a klasoj okupas la restantan kvaronon. Estas ankaŭ 4-a klaso, sed pri tio mi ne skribos, ĉar la leganto povas imagi al si la kondiĉojn, sub kiuj la malfeliĉaj migruloj devas vojaĝi, kiam mi klarigas, ke oni enŝovas ilin kiel bestojn kun apenaŭ sufiĉe da spaco por spirado.

La disciplino inter la ŝipanaro estas kvazaŭ sama kiel ĉe militŝipoj. Ĉe la dua klaso la kelneroj k aliaj servistoj agis meĥanike, kvazaŭ ili estus aŭtomatoj. Tre malagrable estis al mi vidi tiajn modernajn sklavojn, kies sola ambicio ŝajnis esti ricevi trinkmonon je la fino de la vojaĝo.

Pri miaj samklasaj vojaĝkunuloj mi ne skribos, ĉar kvankam ili devenis el multaj landoj, pro sia etburĝa ideologio ili estis tute malinteresaj. Do, kiam alvenis la lasta tago de l' 17-taga vojaĝo, k la ŝipego eniris *Rio de la Plata* (Arĝenta Rivero), sur kiu troviĝas Bonaero *(Buenos Aires)*, mi estis kontenta. Ĉi tie mi deziras atentigi la legantojn, ke tute ne similas al sia nomo la supre menciita rivero: fakte ĝi estas malklara, malbela rivero.

Enirante la havenon oni vidas belajn konstruojn k grandan aktivecon. Jen nova, juna respubliko, vigla k plena je energio, mi pensis. Jen la promesita lando! Sed baldaŭ mi seniluziiĝis. Post fera palisaro staris homamaso atendanta la alvenon de la vaporŝipo. Du policanoj gardostaris ĉe la enirejo por malpermesi surkajiĝi. Ekscititaj homoj atendantaj parencojn argumentis k pledis permeson eniri. Kun miro mi rigardis, kiam subite dramo okazis.

Iu senpacienculo forte puŝis k tiel eligis la ĉapelon de unu el la policanoj. Ĉi lasta sentante sian dignon vundita, rapide turniĝis k levante la brakon, en kiu li tenis bastonon, atakis la plej proksiman de la dense ĉestarantaj homoj, maltrafis, tamen, la de li supozitan kulpulon k frakasis la kapon al apudstaranta virino!

Sabate, la tagon post mia alveno, mi partoprenis ĉe kunveno de l' Argentina Esperanta Asocio. Ĉeestis

LA MOHIKANOJ DE L' MALBENINDA ESTINTO

Ili ne estas kontraŭrevoluciaj aktivuloj, organizantaj konspirojn: ili deziregas la revenon de l' caro, sed ili estas tro timemaj por ia agado. La personoj, pri kiuj mi hodiaŭ parolas, povas nur murmuri k hurli, sed neniel agi.

Ili estas nekontentaj pri ĉio nova, k ili estas pretaj laŭdi ĉion malnovan. Ili priploras ne nur la disrompanton de iliaj antaŭrevoluciaj idealoj (tio estus memkomprenebla); ne — tuta nuna vivo ne plaĉas al ili, ĉiu bagatelo.

Eĉ naturo antaŭrevolucia estis pli bona, ol nuna! Nunjare ĝis la februaro ni en Leningrada provinco preskaŭ ne havis vintron. Certe, la komunistoj ne estas kulpaj; sed tia okazo pligrandigas la nekontenton de la murmuruloj pri nuntempa vivo! Onidiroj, onidiroj k onidiroj!

— Ĉu vi aŭdis? Sinjorino Golovotjapina veturis al Volgoregiono en vagono, plena da frenezuloj. Kaj ili ĉiuj estas frenezaj pro la kolektivigo . . .

— Ho, dio mia! . . .

— Terura vidaĵo! Ĉiuj parolas pri sama temo, tuta vagono deliras . . .

La interparolantaj "sinjorinoj" (vorto "sinjorino" inter la revoluciuloj estas insultvorto, sed "murmuruloj" ĝin uzas en antaŭrevolucia signifo) ne povas kompreni, ke se eĉ ekzistus tia freneza vagono, tamen la fervoja administracio neniam lasus veturi en tiu vagono "sanan" Golovotjapina-n.

— Ho, teruro, — diras alia "sinjorino": — s-ino Svinkina rakontis al mi, ke s-ino Korzinkina ricevis poŝtkarton kun novjara gratulo — k ŝi devis pagi monpunon.

— Nu, ĉu vere?

— Jes, jes, tio estas fakto.

— Ho, teruro! Ho, malbenindaj komunistoj!

Tiajn interparolojn vi povas aŭdi en la hejmoj de l' etburĝoj ke eĉ de parto de la malnova intelektularo.

Kelkaj "sinjorinoj" kunvenis por



Rusio vekiĝas. (Bildo el la jaro 1917)

festi la nomtagon de iu amikino. La interparolo estas ordinara: ili insultas la projekton de nova gramatiko (kiun ili malbone konas — k tial fantazias mokeginde) k de latina alfabeto.

— Sed kie estas Peĉjo? — demandas iu.

— Li foriris en la infanan kunvenon.

— Ha-ha-ha! Verŝajne estas tre interesaj tiuj kunvenoj!

— Ho, certe! Pri kio ili tie parolas?

— Mi ne scias. Verŝajne por la malpligrandigo de l' lernotago? Aŭ pri siaj instruistoj, ĉu ili estas bonaj, aŭ ne?

— Ha-ha-ha! Aŭ por ke la estraro donu al ili senpage bombonojn?

— Aŭ kontraŭ la gepatroj?

— Ho, infanaĉoj!

— Tuta Rusio frenezas, eĉ la infanoj!

— Post la kunveno okazos kino.

— Verŝajne, la infanoj ĉeestas la kunvenojn nur por kino, kiu estas pli interesa, ol diskutoj.

— Ho, certe! Ĉu ili kunvenus por la babilado sen ia interesaĵo? Dum tiu parolado venas bela knabo. La "sinjorinoj" lin ĉirkaŭas.

— Peĉjo, ĉu interesa estis la kino?

— Hodiaŭ kino forestis: la kunveno estis tro longedaŭra, k ni foriris sen kino.

— Kaj pri kio vi parolis dum la kunveno? — demandas iu moketante.

— Ho, estis grava kunveno hodiaŭ, — respondas Peĉjo, ne komprenante la moketon: — Ni havas kelkajn lernantojn, kiuj studas malbone; k ni decidis helpi ilin, por ke ili studu bone.

La "sinjorinoj" silentas: ili pli volonte ekaŭdus alian respondon. Sed ne ĉiam iliaj deziroj estas plenumataj . . .

*

Ho, volu murmuri k hurli la "gesinjoroj"! Ni ne timas ilin, ĉar eĉ iliaj infanoj ofte ne similas ilin.

Nik. Usov, vilaĝo Doriŝĉi, Sovetio.

Ĵus aperis! ĴACK LONDON
LA FERA KALKANUMO
Tradukita el la angla de G. Saville.
368 paĝoj. Formato 12×18 cm.
Prezo 2,60 mk. g., (bindita 3,50 mk. g.)
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27, aŭ Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

proksimume 14, el kiuj 7 malsamnacianoj. Tamen ni ĉiuj interkompreniĝis sen peno. Ĉar mi trovis, ke la plimulto estas klaskonsciaj K-doj, mi laŭtlegis salutleteron, kiun donis al mi K-do *Sherriff* en la nomo de la Glasgovaj K-doj.

Post tiu vespero ne mankis al mi amikoj. Mi forlasis la kunvenon kune kun K-do *Corral,* al kiu mi ŝuldas multajn agrablajn horojn de mia restado en Bonaero. Tamen tuj disiĝi ni ne povis, ĉar tro multon ni havis por rakonti, do ni restadis en kafejo ĝis la 2-a matene.

Dum la du monatoj, kiujn mi pasigis en la argentina ĉefurbo, aŭ unu aŭ la alia K-do kondukis min tra la urbo; tiel mi vidis ne nur la belan, sed ankaŭ la malbelan flankon, kiu estas — nenecese por diri — la laborista kvartalo de la urbo. Dum la rondirado oni prezentis min al sekretarioj de metiunuiĝoj, k tiel ni montris la utilon de esp-o por la laborista klaso. Rilate al virintrafiko, ĉiu strato entenas plurajn publikulinejojn. Ĉi tiuj estas facile koneblaj pro klara lumo, kiu brilas ĉe la enirejo. La virinoj estas ĉefe italaj. Tiel statas en katolika Argentino.

Hazarde mi troviĝis en Montevideo dum la unua Sudamerika Esp. Kongreso (jan. 1926). Multaj artikoloj aperis en la lokaj gazetoj pri tiu okazo; sed ekster tiu reklamo por esperanto la samideana kongreso fiaskis.

Tre amuzis min la agadmaniero de la gvidantoj. Ĉe iu kunveno oni elektis kiel prezidanton aŭ subprezidanton — mi ne bone memoras — pastron, tre sperta esperantisto. Sed ŝajnis, ke li ne povis akcepti sen permeso de la episkopo. Do la komitato devis atendi, dum nia eklezia samideano foriris serĉi lian moŝton k peti permeson. Sed okazis, ke la tutpotenculo ne estis videbla, estis for el la sanktejo; do la komitatanoj devis prokrasti siajn decidojn atendante la ĉielajn benojn.

Tre amuza ankaŭ estis la sugesto de iu diano, ke oni elektu protektantajn sanktulojn por ĉiu sekcio de la kongreso. Kredeble por ŝirmi ilin kontraŭ la malbonaj spiritoj (sendube ni kelkaj SAT-anoj, kiuj partoprenis). Ĉar la ĉeestantaro estis malmultnombra, rezulte estis pli da ŝirmantaj mortaj sanktuloj ol vivaj samideanoj!

Oni sciigis min, ke ĉe la urba katedralo dum la kongreso oni plenumis meson k kantis esperante. Montevideo estas malgranda ĉefurbo; do okazis, ke je distanco de malpli ol kvinminuta promenado de la katedralo troviĝas tuta kvartalo da malvirtaj domoj, kie, dum preĝas la dianoj por savi la homan animon, virinoj devas vendi siajn korpojn por havigi la ĉiutagan panon . . . Tiel mi trovis la kondiĉojn en Sudameriko dum la kristana epoko! *S. H. T. (7471).*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

TAGO EL LIA VIVO

Kial tago el lia vivo? Kial ne li mem priskribas sian tagon? La kaŭzo estas tre simpla — li ne havas eblon priskribi sian tagon, kiu destinis la vivon je multaj jaroj inter la grizaj mortigaj muroj de malliberejo...

Li estas brava junproleto revoluciema, bona kamarado k fervora esperantisto, kvankam komencanto... Loĝante en ĉefurbo de Estonio, Tallinn. al li videbliĝas senjuste malfeliĉa sorto de l' proletaro ekspluatata de l' burĝaro. Tio instigas lin serĉi vojojn por liberiĝo el mizero socia... Konatiĝo kun revolucia laborista movado malfermas novajn perspektivojn k montras la vojon irotan... Lia decido dediĉi sian tutan vivon al idearo de l' proleta klaso... Baldaŭ oni konas lin kiel unu el fervoregaj junaj revoluciuloj. Kvankam komunista partio en Estonio leĝe restas malpermesita, li provas sekrete havi kontakton kun "subplankaj" komunistaj laboristoj.

En jaro 1924 li estas jam 16-jara k aktive partoprenas revolucian movadon. Kiam tiujare la 1-an de decembro revoluciuloj aktive eliras "surplanken" por ŝanĝi la ekzistantan burĝan reĝimon, li estas unua en la vicoj... La provo malsukcesas... Fusiloj plenumas sian "devon" kontraŭ ĉiuj suspektitoj, kiuj ne sukcesis jam forkuri trans limon aŭ morti vundite... Sed la 16-jarulon tamen la militjuĝistaro ne opinias necesa severe puni. Eble ĝi konsideris, ke la junulo timigita per la tragika sorto de siaj kunuloj provos "korektiĝi" laŭ vidpunkto de l' bonorda ŝtata moralo... Oni kondamnas lin kiel neplenaĝulon "nur" je du jaroj da punkorektejo.

Tamen oni forgesis, ke ekzistas konsciuloj, kiuj ne volas ŝanĝi siajn konceptojn k konvinkojn kiel gantojn k neniam forĵetos la interesojn de l' proletaro. Liberiĝinte li denove dediĉas sian tutan energion por organizado k vigligo de l' revolucia lab. movado, ĉar post jaro 1924 kvazaŭ granda ruiniga uragano blovis tra la estonia laboristaro konscia, forportante la revoluciemajn aktivulojn ĉu en malliberejojn ĉu en "forgesitajn" sablokavojn... Denove sekreta polico kaŝobservadas k kolektadas "kulpigan" materialon por iutage akuzi "ŝtatperfidulon" k malamikon de "patrio kara"...

En jaro 1927 estas fondita en Tallinn "Tutlanda Laboristjunula Asocio", kie li partoprenas kiel unu el plej aktivaj gvidantoj k akcelantoj de junlaborista movado. Post kelkaj monatoj oni "ektrovas", ke la asocio (TLA) estas tro komunisttendenca k oni fermas ĝin. Li ne estas tamen provoke arestata, ĉar la polico volas observadi, ĝis la kulpulo sufiĉe estos ŝarĝita per akuza materialo.

Aŭtunon 1928 li devas iri devige militservi en ŝtatajn kazernojn, kie al armeanoj estas inokulata disciplino, tio estas sento de morta obeemo. Sed mucida atmosfero ne povas ekstermi revolucian spiriton. Jam en unuaj tagoj de militservado oni aŭdas lin diri, ke en burĝa militistaro proleta revoluciulo devas lerni kiel manipuli armilojn por poste apliki ilin kontraŭ sia burĝaro...

Nun la pacienco de defenduloj de "ŝtataj interesoj" rompiĝas — ili decidas finfine ĉesigi ĉian influon de tia nesanigebla politika "krimulo". Laŭ ordono de l' ministro por internaj aferoj distrikta milittribunalo prijuĝas lian krimon. Li estas akuzata je partopreno en organizo celanta renversi la ekzistantan ŝtatordon, agitado de komunista idearo k disvastigo de tiasenca literaturo. Ĉe aljuĝo de kondamno estis eĉ konsiderita kiel grava kulpiga dokumento la intima Taglibro de l' arestito, kie oni ektrovis ekz. tian "gravaĵon" — la kulpulo dezirus aŭdi per sia radioaparato ĉiam k ĉiam nur sovetiajn sendstaciojn — kia evidenta simpatio por komunismo (!). La tago de l' finjuĝo estis 25. julio 1929. La legantoj povos eble ne imagi grandon de l' kondamno. Li — mi fine citas lian nomon — *Leonardo Klaaser* estis kondamnata je 12 jaroj da punlaboro. Tiel la 25. julio estiĝis tiu eksterordinara tago el k por lia vivo, kiu findecidis pri longaj teruraj 12 jaroj da mallibereja vivo... Eble nur malmultaj el ni, K-doj, havas tiajn multsignifajn tagojn...

Ĉu post 12 jaroj li eliros el malliberejo kiel maljuna junulo aŭ lin trafos tragika sorto de multaj politikaj malliberuloj vivantaj en mortiga atmosfero de malsaniga malliberejo, ni ne scias... Sed ni esperu, ke la proleta revolucio iun tagon reliberigos lin!...

Junproleto.

DISKUTEJO

Kulturtaskoj

En n-o 298 K-do Nilsen en sia tro rapida recenzo skribas, ke li kredas, eĉ scias, ke multaj SAT-anoj ankoraŭ estas nur internaciistoj k tial ne povas (ne devas?) akcepti miajn tezojn pri sennaciismo. Li demandas min, ĉu mi scias, ke tiaj SAT-anoj ekzistas. Mi respondas, ke mi scias iom pli multe. Mi scias, ke ekzistas eĉ religiemaj k naciistaj SAT-anoj k komunistoj. Sed ĉu ĉi fakto devigas nin nomi nian organon "Piulo" aŭ "Lojala naciisto" aŭ iel en neŭtrala senco? Nia devo ne estas oportuniste kapjesi ilin. Kontraŭe: ni devas konigi al ili pli larĝan k antaŭeneman komprenon pri homrilatoj. Kaj por ni mem ni devas havi ian idean direktilon por sukcese eliri el baraktejo de "reala vivo", antaŭ kiu Nilsen evidente klinas la kapon. Ĝenerale taskoj de kulturtaskoj estas nur konigi pri konkretaj bildoj de revolucio en kulturo respondaj al tiu en ekonomio. Nature ili devas fari impreson pri renverso en sfero de kulturo k tial ŝajni malproksimaj de "realo", de burĝa Nuno. Sed ju pli aspirataj ili estas, des pli proksimaj ili ŝajnos... Psikologia afero!

En la devizo "Kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- k agadkapablo" la vorto *eksternacia* estas uzita en senco de la vorto *sennacia*[1]. Eksternacia ne estas eksternaciisma. Tamen (sole por ne konfuzi novulojn) estus pli bone uzi anstataŭ *eksternacia* la pli precizan *sennacia*. Nilsen estas novulo. Tial lin tiele frapis la vorteto *al* nekutime, sed tute laŭfundamente uzita kiel sufikso. En la vortoj *internacialismo, eksternacialismo* ĉi sufikso ne estas necesa. Uzinte ĝin mi nur utiligis la okazon por montri, ke tia uzo estas ebla, laŭfundamenta k tre oportuna, ĉar vidigas riĉon de esperanto, kiu pro tio bezonas ne idistajn reformojn, sed nur pluan disvolvon de interna tekniko. La sufikso *al* devas esti uzata nur kiam ĝi donas al radiko novan signifon (horizontala, ideala, morala, katedrala, centonala ne estas horizonta, idea, mora, katedra, centona) aŭ kiam estas bezono precizigi uzon de iu vorto (ekz. kiam oni speciale bezonas substreki diferencon inter la vortoj *fina* k *finala*). Nilsen ne scias, ke la vortoj *admiralo, kabalo* estas arabdevenaj radikvortoj k havas saman rilaton al la vorteto *al* kiel la vorto *nebulo* al la esprimo *ne bulo*. *Al* en ili estas nur radikvosto. Nilsen, legu en "S-ulo" mian artikolon: "Atentu spiriton, ne sole literon de Fundamento". En "Kulturtaskoj" mi skribis: "ĉiu superflua signo en uzado estas muelŝtono sur kolon de sekvantaj generacioj" k substrekis la vorton *superflua*. Sed vane, ĉar Nilsen ne komprenis, ke temas nur pri superfluaj signoj, sed ne pri ĉiuj signoj. 28 kapliteroj (grandaj literoj) estos superfluaj, ĉar ili neniel helpus legadon, kiam anstataŭ blindiga punkto estos uzata pli bone distingebla vertikala streko. Sed 8 facile distingeblaj k memoreblaj signoj tre kolorigos legadon k perfektigos skriblingvon k tial estos utilaj, ne superfluaj, ne muelŝtonoj. Simpligon de ortografio oni ne devas kompreni kiel senriĉigon. — Se Nilsen ne tro rapidus recenzi, li tre facile konjektus, ke nunaj muziksignoj esprimas (en peza malfacile kompostebla formo) nur sonskalon k ritmon, sed ne sencan karakteron de

[1] Lanti sendube certigos ĝin.

TRA ESPERANTIO

LA ANGLA LINGVO

Dum la tempo, kiam ni kongresis en Londono, trafis la redaktejon la sekvanta rakonteto, kiun sovetia K-do kopiis el malnova (antaŭmilita) esperanta ruslanda gazeto. Certe ĉiuj legantoj, sed precipe tiuj K-doj, kiuj ĉeestis nian Londonan Kongreson, havos kompreneman rideton por tiu ĉi historieto k dankos al nia sovetia amiko, kiu tre ĝustatempe malkovris k komunikis ĝin al ni.

RED.

Mi estis tre mirigita, renkontinte mian Paŭlon sur strato de urbo M. Lia vizaĝo estis pala, flava, citronsimila, la okuloj malheliĝis, li eĉ maldikiĝis.

— Kio okazis al vi, Paŭlo? Vi estas malsana? — mi demandis lin.

— Ha, silentu k ne demandu min! Mi ĵus revenis el Londono k nun estas ripozanta! La malbenita libristaĉo!

— Mi vin ne komprenas!

— Vi ne komprenas?

Paŭlo elpoŝigis libreton titolitan "Angla-rusa konversacia vortaro".

— Do, aŭskultu! La aferoj venigis min Londonon, kvankam mi eĉ unu vorton anglan ne scias! Kion fari? Mi aĉetis jenan libraĉon. Bone! En Londono mi veturas en rekomenditan al mi hotelon! Sed, ho ve! En la hotelo neniu ruse parolas! Mi malfermas la libron k komencas legi angle: Ĉu vi havas liberan ĉambron? — Jes, sinjoro! — Montru al mi la ĉambron, mi deziras dormi!

— Jen unu ĉambro el la plej bonaj en la tuta hotelo!

Nu, mi estis dankonta la libriston por la vortaro. Vespermanĝinte mi kuŝiĝis por dormi. Je la kvara horo matene, subite mi aŭdas teruran frapadon. La kelnero venis por veki min. Eble ĝi estas eraro — mi pensas — k ne respondis. Sed vi prezentu al vi: ĉiumatene okazas la sama historio! Mi estas vekata je la kvara horo. Mi ellitiĝas k ne scias kion fari! Fine, mi rememoras, ke mi erare tralegis al la kelnero la anglan frazon: *"Call me to morrow morning early"*, kio signifas: "Veku min morgaŭ frumatene!" Sed mi ne sciis, kiel diri al la kelnero, ke li ne veku min. La libraĉo ne enhavis la frazon, kiun mi bezonis...

— Malbenita estu la angla lingvo! — konkludis Paŭlo, maldolĉe svinginte la kapon.

S. Miĥajlovski. Komunikis A. Kreĉetov (16 316).

SE VI DEZIRAS FARI GRANDAN ĜOJON

al via Sovetia amiko k korespondanto, ebligu al li ankaŭ estonte regule ricevi "S-ulo"n, per pago de la abonmono por li al la **Administracio de SAT!**

PRI LA 10-a KONGRESO DE SAT

Ĉar la protokolaro pri la Kongreso ne povas aperi tiel baldaŭ, ni donas por kompletigo al la informoj aperintaj pri nia 10-a en n-oj 305/6 k 307 ankoraŭ jenajn detalojn: En la vestiblo de l' kongresejo funkciis dum la tutaj tagoj *poŝtoficejo*. Leteroj tie enpoŝtigitaj estis stampataj per aparta kongres-stampilo "SAT-Kongreso — Dato — London W. C. 1". En la sama loko troviĝis librovendejo, informtabuloj k akceptejo. En flanka ĉambro estis treege praktika k por la monujoj de l' kongresanoj avantaĝa aranĝo: *bufedo* kun variaj malvarmaj manĝaĵoj k div. trinkaĵoj (gvidis: K-dino *Yelland*). Sendis personajn reprezentantojn al la salutvespero je 3. aŭg. jenaj neesp-aj organizoj: Londona Sindikat-Konsilantaro (je nomo de 300 mil Londonaj sindikatanoj), Amikoj de Sovetio, Skotlandaj ministoj (nacia malplimulto), I. L. P. (Sendependa Labor-Partio), Meblista sindikato britia k redakcio de l' literatura ĵurnalo "Monde". — Ĵaŭde (7. 8.) vespere estis prezentata al la kongresanoj la Ĉe-metodo de instruado. Klarigis ĝin en pli ol duhora parolado kun praktikaj provoj 18-jara K-dino "Anjo Kolombo" el Nederlando.

Raporto pri la Publika Kunveno pri klaspartieco en Edukado, organizita de la Instruista Laborista Ligo (TLL) en Anglio, okaze de la 10-a SAT-Kongreso

Londono, 6. aŭgusto 1930.

K-do *Veness* (Londono) prezidis k la ĉeestantaro aŭskultis interesajn raportojn el kvar landoj: el Aŭstrio (K-do *Watzinger*), el Anglio (K-dino *Osmond*), Francio (K-do *Boubou*), Sovetio (K-do *Babejkin*, legita de angla K-dino). La raportoj estis tradukataj anglen por la angla publiko, kiu estis invitita partopreni la kunvenon.

Estis klare montrita, ke nur en Sovetio ĉiu sufiĉe kapabla infano povas atingi la plej altan ŝtupon en edukado, ĉar en la aliaj landoj ekzistas diversaj tipoj da lernejoj, k nur tre malmulte da infanoj de malriĉaj gepatroj, pere de stipendioj, povas eniri la plej altajn lernejojn k universitaton. Tial tiuj kapablaj proletidoj facile fariĝas burĝemaj k estas perditaj el la vicoj de l' laboristaro. Je la nuna tempo en Aŭstrio, Francio k Anglio la eklezioj sukcesas gajni pli da povo en la lernejo, kiel ankaŭ en Belgio k Nederlando. La reakcia tajdo en Aŭstrio estas ankaŭ videbla en la reapero de ŝovinistaj lernolibroj k la rekomenco de persekutado al geinstruistoj pro politika agado. En Francio sub la maldekstra bloko persekutado restas kiel antaŭe; ekzemple pro partopreno en manifestacio de 1. aŭg. 1929 instruisto estis malliberigita k eksoficigita. Eĉ dum libertempo instruisto ne povas agi politike, ĉar tiel li rompas la neŭtralecon, pri kiu la estroj k burĝoj tiel laŭte parolas, sed kiun ili mem ne observas. La francaj k anglaj avangardaj instruistoj daŭrigas la batalon kontraŭ la naciemaj, kontraŭproletecaj lernolibroj k sukcesas forigi la plej malbonajn.

En Sovetio memregado de infanoj, helpata de pedagogia kolektivo k gepatra kolektivo anstataŭas la rigidan disciplinon, kiun oni trovas preskaŭ senescepte en aliaj landoj. Ankaŭ la skolastiko ne plu ekzistas tie, sed laboro bazita sur naturo, laboro k socio, estas farata laŭ la Dalton-plano, kolektiv-verkaj k aliaj plej modernaj metodoj. La rusa raporto pravigis la vortojn de K-do *Boubou*, kiam li diris, ke la ĝusta celo por la avangardaj geinstruistoj ne estas senkonfesia (laika) lernejo, sed proleta lernejo, k ke ĉiu SAT-edukisto devas legi "Sovetan Pedagogian Revuon", kiu montras la provojn de niaj sovetiaj K-doj en la kreo de proleta lernejo. *9896.*

frazo. Muziko uzas vicon da italaj vortoj (*diminuendo, forte, piano, sforcando* k. a.) nur por esprimi ĝeneralan sonan, ne sencan karakteron. Sed tiaj sub- aŭ superliniaj vortoj evidente ne taŭgas por celoj de ortografio. Ale mi notu, ke emocisignoj de "Kulturtaskoj" pro manko da specialaj pressignoj estis transdonitaj nur proksimume. En originalo ili estis pli simplaj k distingeblaj.

7-a horzono, nordo. *M. Krjukov.*

TRA LA MOVADO

KRONIKO

ĈEĤOSLOVAKIO. 12. junio malfermiĝis kurso kun 5 p. en Plzen-Peklo. La grupo esp-igis unuaktan ĉeĥan komedion, kiu estas ludota de la membroj. 9. julio okazis ĝen. kunveno en lab. domo. La urbestro donacis 300 kr. ĉ. k la metallab. grupo en

Plzen 100 kr. — *GERMANIO. Chemnitz.* LEA-grupo kunvenis 19. 7. k parolis pri la minacanta skismo en GLEA. K-do Kaiser (1760) oratoris. Laŭ li LEA komunistiĝis k do socialistoj ne plu povas sukcese uzi ĝin. Sekvis vigla debato. Propono de l' grupestraro kolektive eksiĝi el LEA estis malakceptata per 17 kontraŭ 30 voĉoj. Por eksiĝo voĉdonis socialistoj, kontraŭ ĝi komunistoj k kelkaj senpartiuloj. Post la voĉdono plej multaj estraranoj demisiis k estis elektata tute nova estraro (vd. n-on 304). La socialistaj Gek-doj antaŭvideble fondos novan grupon. — *SOVETIO. Kiev.* En Ukrainio organiziĝis la unua kontraŭalkohola teatro, kiu vojaĝas tra la tuta lando, prezentante kontraŭalkoholajn spektaklojn. Nuntempe ties direktoro T. P. Kolesniĉenko same kiel kelkaj aktoroj interesiĝis pri esp-o k intencas organizi la unuan tutukrainian internacian teatron. La ĉe red. de "Prol. Pravda" organizitan labkor-rondeton gvidas esp. K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ. Oni presigas en tiu ĵurnalo priesp. artikolojn, kiujn oni atendas el eksterlando. (Adr.: *Kiev,* Leninstr. 19, Proletarska Pravda, Esperanto).

ĈE LA NEŬTRALULOJ ◆

La 22-a Universala Kongreso de Esperanto okazis komence de aŭgusto en *Oksfordo* sub la protektado de la Duko de Konot (*Connaught*) k la ministro por eksterlandaj aferoj *Henderson,* en ĉeesto de proks. 1200 kongresanoj el 30 landoj. La registaroj de Aŭstrio, Germanio, Brazilio, Hungario, Liĥtenŝtajn, Nederlando, Norvegio, Pensilvanio, Polio, Rumanio k la aŭstralia ŝtato Viktorio, kiel ankaŭ la urbestraro de Oksfordo k la Internacia Labor-Oficejo estis oficiale reprezentitaj. La venonta kongreso universala (23-a) okazos en aŭgusto 1931 en Krakovo, k tiu de l' jaro 1932 okazos en Parizo.

RECENZEJO ◆

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Molière, La Mizantropo, Komedio en kvin aktoj, tradukita el la franca de Prof. *H. Boucon* (Bukon). Formato 12×18 cm, 104 pĝ. Prezo: 10 fr. frk. Eld.: Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, *Paris.*

Tre bone agis prof. Bukon rezignante la rimon en sia traduko. Sed kial do li elektis la rapidegan kvar-amfibrakan verson, por traduki majestajn, piedmarŝajn, eĉ pezajn francajn dekdusilabajn versojn de l' 17-a jarcento?

La *dubraka* (amfibraka) ritmo kuras, flugas. Ĝi estas, kun unu braketo antaŭ, unu braketo post la akcento, la ritmo mem de *valso.* Ĝin uzis poetoj por pentri malpezon, rapidon. Ekzemple, *Karduĉi* (Carducci): *"Urlate, ballate, menate gazzara",* Ekzemple *R. Ŝvarc: "Ŝi hejmen revenis kun granda skatolo".* Ekzemple *Miĥalski: "Ĉu aŭdis vi ion dum nokto silenta?".*

Ĝi tute ne parencas kun franca dekdusilaba verso, kvankam dekdu ŝajnas parenci kun dekdu aŭ dekunu. Ĉu tri kvartempaj taktoj similas al kvar valsaj taktoj, kiuj entenas ankaŭ dekdu tempojn? Tute ne.

La du belajn versojn:

"Je veux que l' on soit homme, et qu'en toute rencontre
le fond de notre coeur dans nos discours se montre"

s-ro Bukon tradukis tiel:

„Mi volas, ke ĉiam ni estu sinceraj,
Ke ĉiam en niaj paroloj vidiĝu
la fondo de l' koro.

Plej bone traduku prozen! Prozon vi povos iafoje ritmigi laŭ la originalo, almenaŭ.

* * *

Molier (*Molière*) estis tre *rapida genio.* Certe, la plej multaj el la versoj de liaj humorplenaj teatraĵoj estas *rapidege faritaj.* Ili nur utilas kiel *cemento* inter la grandaj, precipaj, frapaj versoj. Tial, devus esti tradukataj *samritme, sambilde, samforte* precipe *tiuj grandaj versoj,* kiujn ĉiu leganto dum lego rimarkas.

Tion ni ne trovas en la traduko de s-o Bukon. Kiel ekzemplo servu la du antaŭcititaj versoj, potenca vers-duo, senforte imitita en la tri versoj de s-o Bukon, kun perdo de la stilo, de tri bildoj k de la tuta ritmo! Mi perferus kiel tradukon:

"Ni devas esti homoj, k en ĉiu okazo
ni montru parolante nian koron ĝis fundo."

Tiu ritmo, antaŭnelonge renovigita en franca lingvo mem de modernaj poetoj, *ĉiam* praktikita en popolo mikse k interŝanĝe kun dekdusilaba verso, taŭgus tre bone en esp-o, lingvo kun nepra finaĵo, por traduki dekdusilabversojn.

Krom tiuj riproĉoj, mi ĉiam aprobos la kreon en esp-o de tutmonda literaturtrezoro. Ni ne plu legu nacilingve tradukojn de nacilingvaĵoj. Ni legu *nur en esp-o tradukojn,* esp-o sola povas traduki ne kripligante, ĉar ĝi estas senidiotisma, tute fleksebla sennaci-lingvo.

Nur en esp-o tradukojn! *Jief.*

V. N. Engelhardt, Lernejo, Instruistaro k Esperanto. Eldonkvanto: 10 000. Eld. CK SEU, Moskvo. 1930. 16 pĝ. Form. 11×14. Prezo: 5 kopekoj.

Propagandilo ruslingva por varbado ĉe instruistaj rondoj.

Gvidlibroj ktp.

Linz a. D. (Supra Aŭstrio k ĝia ĉefurbo). Gvidfolio eldonita sub la aŭspicioj de UEA per la urba oficejo k la landa unuiĝo por fremdultrafiko. 4 pĝ. Ilustrita. Havebla senpage ĉe: Fremdenverkehrsbüro d. Stadt Linz, Platz des 12. November 10, Linz a. D., Aŭstrio.

Zittaŭ k Zittaŭaj montoj. Havebla ĉe: Verkehrsverein E. V., *Zittau* (Porfremdula Asocio). Tre bela, mult-ilustrita 12-paĝa prospekto en kupropreso kun detalaj informoj pri la tuta regiono. Bela propagandilo!

Elektroteknika Instituto de Grenoble, kiu estas aparta sekcio de la "Politeknika Instituto" ĉe la Universitato, eldonis dupaĝan ilustritan prospekton en esp-o. *Nur por studentoj,* kiuj pro pliaj informoj sin turnu al la direktoro de l' Instituto, 46, aven. Félix-Viallet, *Grenoble* (Francio).

Fyrväpplingen. Gazeto por popolkulturo de sveda "Excelsior-Asocio" E. G. Torgny, *Skara* (Svedio). Junio. Speciala esp. n-o pri "realigado de la monda paco" per popola klerigo. 4 pĝ. Form. 22×29 cm. Abonprezo ne montrita.

NEKROLOGO

La 10. aŭgusto mortis en Nîmes-a sanatorio

K-dino Aleksandra Demidjuk



SAT-anino 4540, fratino de K-do G. Demidjuk (Moskvo), kunulino de K-do Salan (Nîmes). Malgraŭ ke ŝi estis laborinvalida, ŝi de kelkaj jaroj fervore partoprenis nian movadon. En Moskvo ŝi fordonis tutan sian tempon k sindonon al propaganda k organiza laboro de SEU. En Francio, kien ŝi veturis dum aprilo 1929, ŝi sukcesis interesi pri nia movado la Montpellier-ajn revol. studentajn rondojn. En Nîmes-a sanatorio, kien ŝi eniris antaŭ kelkaj monatoj, kvankam grave malsana, ŝi pasie interesiĝis pri ĉio rilata al la vivo de nia organizo k tre helpis al la lokaj K-doj.

Honoron al ŝia memoro k nian koran simpation al ŝiaj proksimuloj.

Direkcio de SAT.

MEMORNOTO ◆

Represis el "S-ulo":

Volksstimme, Chemnitz, 25. 6. (E. S. 228); *La République,* St. Etienne, 9. 7., vizito en Sofia klubo. *De Vrijdenker,* Amsterd., 26. 7., Solvo de l' juda probl. en Sovetio; *L'Ouvrier Libre,* Mülhausen, 26. 7., ITF (298); *Juna Bolŝeviko,* Kiev, 16. 7., Kiel mi vizitis klubon en Sofio (298).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 10. 7., 17. 7., 24. 7. (pri SAT); *The Shop Assistant,*

London, 12. 7.; *Le Prolétaire,* Liége, 5. 7.; *Le Travailleur Alpin,* Grenoble, 19. 7. (ankaŭ peresp. mat.); *Le Semeur,* Falaise, 24. 7.; *El Socialista,* Madrid, 22. 7.; *Muldenthaler Nachr.,* 30. 4., 4. 6., 28. 6.; *Volksstimme,* Chemnitz, 3. 5., 31. 5., 17. 6., 18. 6., 24. 6.; *Glauchauer Tageblatt* k *Glauchauer Zeitung,* regulaj esp. anguloj de aprilo ĝis junio; *L'Eclaireur du Soir,* Nice, 20. 7. (pri Pl. Vortaro).

The Labour Woman, London, aŭg. (rubr.); *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 23. 7., 26. 7.; *Juna Bolŝeviko,* Kiev, 2. 2., 6. 2., 9. 2., 13. 2., 20. 2., 23. 2., 13. 3. (kurso); *D. Kommunalbeamte,* Berlin, 26. 7.; *Signalen,* Stokholm, 31. 7.; *Münchener Post,* 2. 7., 8. 7.

Pri SAT-Kongreso raportis:

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 5. 7.

Peresper. materialon enpresis:

Vsegda Gotov, Ivanovo-Voznes., 1. 7. 20. 7.; *Juna Bolŝeviko,* Kiev, 27. 2., 6. 3., 9. 3., 20. 4., 30. 4., 5. 6., 6. 7., 20. 7.; *Korpa Kulturo,* Kiev, 20. 7.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 30. 7.; *Neue Zeitung,* München/Nürnberg, 1. 7., 5. 7., 7. 7., 9. 7., 19. 7., 29. 7., 30. 7.

NIA POŜTO

1528. — Ni ricevis vian manuskr. k kredeble uzos ĝin en "LNE".

10 634. — Ni ricevis la kantojn. Ni uzos nur en okazo de bezono.

13 619. — Ni uzos, se loko permesas.

16 316. — Jes, viaj artikoletoj estas bonvenaj. *Red.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do A. Miesenböck, Salzgasse, 171 *Freistadt,* petas alsendon de PM, prefere de Ĉinio, Turkmenio, Afganio, Egiptio, Nepalo k jubileaj eldonoj de Sovetiaj resp., Japanio, Siamo, Persio ktp. Rekompence mi sendos PI, il. gaz.

BELGIO

K-do A. Houben, Kemmelbergstr. 3, *Berchem-Antwerpen* dez. interŝ. PM kĉl de 100 ĝis 500 specoj.

BRITIO

Adresŝanĝo: K-do W. Latimer (10 637) nun loĝas: c/o Rutter, 63, Hexham Ave, Walker Estate, *Walker,* Newcastle-on-Tyne.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Hugo Langer (frizisto), *Meistersdorf, 54 ap. Steinschönau,* (Nord-Bohemio), kĉl, PI, PM, bfl.

— Kiu sendas al mi PM de niaj najbaraj landoj kontraŭ sama kvanto. Adr.: Josef Wuchterl, *Holeischen, 127 ap. Pilsen.*

FINNLANDO

K-do Sulho Lehto, *Raisio,* interŝ. PM kun komencaj filatelistoj.

FRANCIO

Liberpensuloj el ĉ. l. sendu por ekspozicio aranĝota de Liberpensula Klubo de Pierrefitte ap. Parizo (precipe esp-ajn) ateistajn ĵurnalojn, afiŝojn ktp. Ni respondos al ĉiuj. Adr.: K-do Brazzini René, 23 rue Augustine Maréchal, *Pierrefitte,* Seine.

GERMANIO

ATENTU! Ni aranĝos la 5. okt. 1930 ekspozicion, pro tio ni petas alsendon de materialo el ĉl., PI, bfl., afiŝoj ktp. Ni rekompencos ĉiun. Adr.: "Lab. Esp. Grupo", Spremberger Str. 9, *Weisswasser O/L.*

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

K-do Anton Kienzle, Senefelderstr. 45/III., Stuttgart, kĉl, pri religioj, ateismo, socialismo, precipe kun Japanio, Rusio k Balkanlandoj.

K-do Gerh. Bartczek ĉe Fr., Kuhlmann, Laibnitzstr. 16, *Dortmund,* kĉl, krom Sovetio, L, PK, PM, fotoj.

— Tri K-doj: E. Schwers (27 j.), E. Paas (17 j.), K. Lang (18 j.) koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. garantiata. Adr.: *Solingen,* Königsmühle, 16.

Tramistoj atentu! — Mia nuna adreso estas: A. Liebs, Leisniger Str. 15/II., *Dresden-N.* 22.

— Naŭ K-doj serĉ. koresp. Skribu al: Willi Wötzel, Chemnitz Sa. Fürstenstr. 9 II.

K-do Alfredo Conzeth, (Kompostisto) *Mülheim-Ruhr,* Lerchenstr. 26, serĉ. koresp. pri prof. temoj, ankaŭ kun fraŭlinoj. Nepre resp.

K-do Franz Hermann, Breitestr. 3-a, *Diemitz b. Halle,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

HUNGARIO

Kvin Gek-doj en urbo *Szombathely* koresp. kĉl, L, PI:

K-dino Gizus Polgár: Felsööri str. 1

K-dino Mario Müller (15-jara): Szent Márton str. 17

K-dino Margareto Lintner: Görög str. 86

K-do Johano Szivos: Kosuth Lajos str. 4

K-do Vilh. Somogyi: (27-jara pentristo): Szent Eleki str. Szöllös.

JUGOSLAVIO

K-do I. Horvat, tiskara Freund, *Vukovar,* PM, Senf, Eŭropo 1930, krom Sovetio. Ne sendas unue.

LATVIO

— Du junaj K-doj volas interkoresp. k. ĉ. l. letere k per il. pk. Certe resp. Bonvolu skribi al S-ro Leo Plaks, Dartes eela 15, *Liepaja.*

POLIO

K-do W. Kozikowski, Kamionowska 10—5, *Warszawa,* jun. pola metallaboristo serĉas iun ajn laboron.

K-do Teodoro Regula, *Nowa Wies,* ul. 3 go maja 6, pow. Katowice, kĉl, pri ĉ. temoj, krom Polio.

SOVETIO

K-dino Valentino Buŝmarina, Ptaŝkinoboloto, 45, *Tver,* kĉl, pri ĉ. temoj, PK.

K-do M. Toporov (fotoamatoro), Nikitinskaja str. 50, kv. 1, *Samara,* interŝ. fotojn, fotoĵurnalojn, pri ĉ. temoj kun ĉl. fotoamatoroj.

— 8000 konstruistoj k 12 000 ministoj dez. kor. kĉl komun. labor. k revol. organiz. pri ĉ. t. Interŝ. il. gaz., fot., libr. Resp. gar. Adr.: *M-Nesvetaj* Ŝaĥt. okr. redakcio "Kominternovec".

K-do N. Ŝĉegolev (13 503), *Barnaul,* pro forveturo devas ĉesigi la korespadon. Nova adr. baldaŭ sekvos.

SVEDIO

— Depost la 1-a sept. membro 12 286 (tramisto), *Göteborg,* havos jenan adreson: Brahegatan 18, eniro B. 3-a et. Bv. korekti en jarl.



Intersteno-lernolibroj
Koresponda skribo por Esperanto RM 1.—
Rapida skribo por Esperanto . . RM 1.—
3 aldonoj por po 7 naciaj lingvoj po RM 1.—
Instituto de Intersteno
Friedenstr. 79, Duisburg (Germanio)
Haveblaj ankaŭ ĉe la
ADMINISTRACIO DE SAT
Colmstrato 1, LEIPZIG O 27.

ENHAVO

	pago
Giordano Bruno — Martiro de l' libera penso	515—16
Ĉu Estonio ricevos novan konstitucion?	516—17
Romantikaj ludoj	517
La kalejdoskopo de l' vivo	517
Vojaĝaj impresoj	517—18
La Mohikanoj de l' malbeninda estinto	518
Tago el liva vivo	519
Diskutejo	519—20
Tra Esperantio	520—22
Korespondado	522

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)